# 13-a Esperantista Migrado Aŭtuna EMA 2025



19-a ĝis 24-a de oktobro 2025
(dimanĉo ĝis vendredo)
en Plön / „Holsteinische Schweiz“

© Gerald Roemer

# Programo kaj loko

Ĉiutagaj migradoj en la vidinda pejzaĝo ĉirkaŭ la tri urbetoj Plön, Malente kaj Eutin. Ili situas en la nordgermana malaltebenaĵo en la tielnomata „Holsteinische Schweiz“, belega svinganta naturo kun 200 lagoj, kun historioplenaj urbetoj kaj pitoreskaj kasteloj. Ni vizitos la inter multaj lagoj kuŝantan Plön, migros ĉirkaŭ la „Großer Eutiner See“, tra kastela parko kun vizito de la kastelo, ŝipveturos trans la „Großer Plöner See“ al Bosau por remigri al Plön, promenos ek de Malente apud la „Dieksee“ kaj aliaj lag(et)oj.

Detala programo: **www.esperanto.de/ema**

> Tuj poste, de la 24-a ĝis la 26-a de oktobro 2025, okazos la jam tradicia **„Gramatika Semajnfino“** kun **Peter Weide**, organizata de „Esperanto Hamburgo r.a.“ – en la sama ejo. Bonvolu rigardi:
> https://www.esperanto.de/eo/gramatika-semajnfino-2025

La programo estas provizora kiel dum ĉiuj migradoj, dependas de la aktualaj kondiĉoj, ekz. la vetero. Publikaj trafikiloj estas relative oftaj, kelkfoje ni uzos ilin. Sen aparta vespera programo. Kiu ŝatus oferti programeron, bv. informi la organizanton.

## Necesa sporteca kapablo

Ĉiutage ni migros proksimume de la 9-a ĝis la 17-a horo – kun paŭzoj. Estos relative facilaj etapoj. Oni kapablu iri distancon de ĉ. 15 km kun maloftaj altodiferencoj ĝis 50 metroj.

**Plön** situas norde de Hamburgo – inter Lübeck kaj Kiel. Ĝi estas distrikta urbo kun ĉ. 9000 enloĝantoj. La urbo estis menciita antaŭ pli ol 1000 jaroj kiel rezidejo de slava reganto. Ekkonilo de al urbo estas la blanka surmonta apudlaga kastelo, konstruita en la 17-a jarcento.

> https://www.ploen.de/
> https://www.holsteinischeschweiz.de/

# Nia tranoktejo kaj kostoj

## Nia tranoktejo

La Evangelia junulara, libertempa kaj kleriga ejo Koppelsberg situas tri kilometrojn okcidente de la malnovurbo kaj de la stacidomo, kun buskonekto. Ĝi posedas 250 litojn en pluraj domoj sur granda tereno. Ĉiuj niaj ĉambroj havas duŝon/necesejon. Migradvojo komencas preskaŭ tuj apude.

**Ev. Jugend-, Freizeit- und Bildungsstätte Koppelsberg (EJFB)**
Koppelsberg 12
24306 Plön
Tel. +49 4522 507-230
Retpoŝte: rezeption-jfbs@diakonie-nordnordost.de
Interreta paĝo:
https://www.herbergen-im-norden.de/koppelsberg

## Kostoj

| | ĝis 2025-03-31 | ĝis 2025-06-30 | „malfruaj birdoj“* |
|---|---|---|---|
| Kotizo | 395€ | 415 € | 435 € |

* 2025-07-01 ĝis 2025-07-20

Tiu partoprenkotizo validas por unu persono: En 2-lita ĉambro aŭ en plurlita ĉambro por du personoj. Ĝi inkludas 5 tranoktojn kun matenmanĝo, 5 ĉefe malvarmajn vespermanĝojn, 2-foje provianton survoje, enirbiletojn, ŝipveturadon.
Ne inkludita: Transporto per publikaj transportiloj kaj 2-foje tagmeza manĝo en restoracio.

**Krompago** por 1-lita ĉambro: **65 €** (ankaŭ se vi ne trovos kunulon/kunulinon por via ĉambro)

**Rabato** de 30 € por ordinaraj membroj de Germana Esperanto-Asocio kaj por homoj, kiuj ne loĝas en Germanujo

# Aliĝo kaj kontakto

Via aliĝo ekvalidos post atingo de la antaŭpago de minimume 50 € po persono sur la konto de

> Deutscher Esperanto-Bund
> Sparkasse Odenwaldkreis · BIC: HELADEF1ERB
> IBAN: DE32 5085 1952 0040 1145 71
> Eblas ankaŭ pagi al la UEA-konto: geaa-n

Sur la ĝirilo indiku kiel koncernon:
„EMA 2025" + via familia nomo

**Vi pagu eventualan reston ĝis 2025-06-30.** Por la „malfruaj birdoj" la aliĝo ekvalidos nur per la pago de la plena kotizo.

**Malmendo/prezaltigo:** La antaŭpago de 50 € ne estos repagata, sed vi povas peri anstataŭanton. Ni aldone fakturos la eventualajn kostojn de malmendo post la 2025-07-20 (laŭ la kondiĉoj de la tranoktejo).

Per via aliĝo vi eksplicite deklaras vian konsenton kun tiuj ĉi kondiĉoj.

## Maksimuma nombro de aliĝoj:

17 – pliajn aliĝojn ni devos interkonsenti kun la EJFB Koppelsberg.

## Bonvolu aliĝi elektronike:

**en la interretaj paĝoj: www.esperanto.de/ema**

## Organizanto / kontakto:


> Gerald Roemer, Hamburgo, Germanio
> Telefone: 0800-336 36 36-66 (ene de Germanio)
> Retpoŝte: ema@esperanto.de


© Germana Esperanto-Asocio r.A. 2025